# *Kubaj deputitoj pritraktas ekonomiajn kaj sociajn temojn.*



Havano, 17 dec (RHK) La deputitoj de la nacia asembleo de la popola povo de Kubo da?rigas sian sesion en la Palaco de Kongresoj en laborkomisionoj kiuj pritraktas ekonomiajn kaj sociajn temojn.

En tiu ?i dua laborsesio la parlamentaj grupoj debatas pri la plibonigo en la programo de la kuracisto kaj flegistino de la familio, kerna ero de la sistemo baza de la insulo; ili anka? pritraktas la epidemiologian situacion de la lando kaj la rezultoj de la kontrolo kaj reviziado de la nekrologiaj servoj.

La komisionoj de ekonomiaj aferoj kaj industrio, konstruado kaj energio, analizas la evoluon de la konstruprogramo kaj rehabilitigo de lo?ejoj, samkiel la produktadon de materialoj por tiu sektoro.

Pri la komisiono de konstituciaj kaj juraj aferoj, ?i pritraktas la raportojn de la ?enerala prokuroro kaj de la popola supera kortumo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/179047-kubaj-deputitoj-pritraktas-ekonomiajn-kaj-sociajn-temojn

# Radio Habana Cuba